

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 92, Februaro 2026



Ruino de la preĝejo de Härlanda, unu el la plej malnovaj kristanaj monumentoj en la Gotenburga regiono.

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

# Enhavo

Enhavo.....	2	Diskutado kun Artefarita Inteligento, <i>Walter Klag</i> .....	16
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Batita kremo – Demando al AI, artefarita inteligento, <i>Walter Klag</i> .....	17
Espeporko meditas.....	3	AI ricevas la serĉvorton Esperanto, <i>Walter Klag</i> .....	18
Hajkoj atendante la printempon.....	3	”Terräng-Axel” .....	19
La memortago pri la Holokaŭsto.....	4	Ruinoj de la malnova preĝejo de Härlanda .	21
Förintelsens minnesdag .....	4	Härlanda gamla kyrkoruin.....	21
Kiel uzi Esperanton? Intervjuo, <i>Rianne Sanders</i> .....	4	Sekretaj paradizaj lokoj, <i>Emelie Hultman</i> .....	23
Dokumentoj el la Esperanto-Societo de Borås.....	7	Smultronställen, <i>Emelie Hultman</i> .....	23
Dokument från Borås esperantoklubb.....	7	Retrovi la vojon, <i>Tatjana Auderskaja</i> .....	25
Ŝercoj de Josef kun komentoj de Siv.....	10	Elmigri al Marso? .....	27
Malkuraĝulo (mini-rakonto), <i>Josef Kříž</i> .....	12	Emigrera till Mars?.....	27
Verdaj plendoj.....	13	Demokratia projekto en Alingsås – Campus, Alingsås .....	31
Vegana societo .....	14	La Frenezula Turo – ebla vizitloko dum UK 2026, <i>Walter kaj Renate Klag</i> .....	32
Bovino super Sarek-montegaro .....	15	Kaj fine – kvizo .....	32
Ko över Sarek .....	15		



*En februaro 2025 nia klubano Jan Hellström fote kaptis ĉi tiun paron de Mandarenanaso (Aix galericulata) en lageto norde de Gotenburgo. Verŝajne ili ne estas sovaĝaj, sed forflugintaj el iu parko.*

## Pri Ora Ĵurnalo

*Ora Ĵurnalo* estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com). Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

*Ora Ĵurnalo* n-ro 92 ankaŭ troviĝas en versio por la poŝtelefono ĉe [www.esperanto-gbg.org/92](http://www.esperanto-gbg.org/92)



## Espeporko meditas



- Rimarkendaj tagoj en februaro: 6/2: La nacia tago de la sameoj.
- 14/2: La Valentena tago.
- En ĉi tiu numero **AI** plenigas la paĝojn. Ni ne timu la sufiĉe novan teknikon, sed uzu ĝin! Kelkaj personoj eĉ amuziĝas kune kun AI. AI ja konas Esperanton! 😊
- Eĉ pli fantazie estas la novelo de **Tatiana Auderskaja** pri elmigrado al la planedo Marto – sed ankaŭ iomete malĝoja. Ĉu ni ne kapablas bremsi la malbonigon de la klimato kaj la malamikecon inter landoj sur la Tero, kiu ja estas nia hejmo?
- La memoro de la holokaŭsto devas resti viva, malgraŭ ke la lastaj homoj, kiuj transvivis la ekstermon fare de naziistoj ne estas multaj. Tamen la problemo restas. Respekto pri humaj rajtoj estas grundo por demokratio.
- **Rianne Sanders** el Nederlando dum piediro en Francio renkontis paron, kiu parolis Esperanton. La junulino Evelyne tiel vigle kaj entuziasme rakontis pri Esperanto, ke baldaŭ poste Rianne decidis eklerni la lingvon. Nun Rianne en

sia vico entuziasmigis aliajn junulojn. Tiajn personojn ni vere bezonas!

- La kulturo de norda Svedio pli kaj pli atingas la tutan Svedion per filmoj, libroj kaj kantoj. Leginda/aŭskultinda estas la Nordaj kantoj. Unu el la viroj, kiuj formis *Norrlåtar* nomas sin Pessimistkonsult – Pesimista konsulto, eble ĉar homoj antaŭe devis transloĝiĝi suden por havi laboron. Nun estos pli kaj pli male: laboroj troviĝas en la nordo.
- **Emelie Hultman** rakontas pri belaj paradizaj nordaj lokoj i.a. en la montegoj de Kiruna.
- **Ingegerd** plibonigas nian scion pri Gotenburgo. Nun ŝi rakontas pri tute malsimilaj lokoj: pri kultura preĝejo heredaĵo kaj pri rubstaplejo.
- Ĝis marto kaj printempo! Tiam mi certe pli bone regos mian novan komputilon. La malnova paneis. Por la unua fojo mi nun havas Mac-komputilon. Malfacile kompreni ĝin!

/Siv

## Hajkoj atendante la printempon

Kun la printempa vento  
la ardeo flugas blanka  
inter la pinoj

*Raizan*



Per malsekaj piedoj  
la pasero faras saltetojn  
sur la verando

*Shiki*



## La memortago pri la Holokaŭsto



## Förintelsens minnesdag

La tago de memoro pri la Holokaŭsto okazas ĉiujare la 27-an de januaro kaj estas internacia tago por honori la viktimojn de la Holokaŭsto kaj por kontraŭstari rasismon kaj maltoleremon. La dato markas la liberigon de la koncentrejo Auschwitz-Birkenau en 1945. En Svedio, kie ĝi estas nacia tago de memoro ekde 2001, ceremonioj kaj edukado estas organizataj, interalie, per la Forumo por vivanta historio.

- **Fono:** La 27-an de januaro 1945, sovetiaj trupoj liberigis la ekstermkoncentrejojn Auschwitz-Birkenau.
- **Celo:** Memori la ses milionojn da judoj, same kiel romaojn, GLAT-homojn, homojn kun handikapo kaj aliajn, kiujn murdis la nazioj, kaj honori tiujn, kiuj rezistis.
- **Atentas:** La tago emfazas la gravecon de demokratio kaj la egalan valoron de ĉiuj homoj, ofte per kampanjoj #WeRemember kaj lokaj eventoj.
- **Svedio:** La Forumo por vivanta historio organizas oficialajn memorceremoniojn kaj kunigas agadojn tra la tuta lando.

La memortago estis internacie establita de UN en 2005.

infaller ĉrligen den 27 januari och är en internationell dag för att hedra offren för Förintelsen och stå upp mot rasism och intolerans. Datumet markerar befrielsen av koncentrationslägret Auschwitz-Birkenau 1945. I Sverige, där det varit nationell minnesdag sedan 2001, anordnas ceremonier och utbildning genom bland annat Forum för levande historia.

- **Bakgrund:** Den 27 januari 1945 befriade sovjetiska trupper förintelselägret Auschwitz-Birkenau.
- **Syfte:** Att minnas de sex miljoner judar samt romer, hbtqi-personer, funktionsnedsatta och andra som mördades av nazisterna, samt hedra de som stod emot.
- **Uppmärksammande:** Dagen belyser vikten av demokrati och alla människors lika värde, ofta genom #WeRemember-kampanjer och lokala arrangemang.
- **Sverige:** Forum för levande historia anordnar officiella minnesceremonier och samlar aktiviteter över hela landet.

Minnesdagen etablerades internationellt av FN år 2005.

## Kiel uzi Esperanton? Intervjuo

Rianne Sanders, Nederlando, intervjuas junan amikino – Evelyne.

*Rianne:* En la somero de 2024 mi renkontis Evelyne kaj ŝian partneron dum piedirado tra Francio. Ili estis la unuaj esperantistoj, kun kiuj mi iam ajn konatiĝis. Mi tranoktis ĉe ili

kaj dum tiu vespero Evelyne tiel vigle kaj entuziasme rakontis pri Esperanto, ke baldaŭ poste mi mem decidis eklerni la lingvon.



De tiam kreskis en mi la deziro intervjui homojn en Esperantujo, kiujn mi trovas interesaj kaj inspiraj. Evelyne, franca esperantistino kun longjara kaj profunda engaĝiĝo

– precipe en Afriko – estas la unua el ili.

### **Kiel vi ekkonis Esperanton kaj kial vi decidis lerni ĝin?**

*Evelyne:* Kvankam mi ne spertas pri lingvoj, mi ŝatas ilin! Iam mia amiko Jean-Pierre konatigis al mi, ke li havas metodon por lerni Esperanton. Ĉu? Mi apenaŭ aŭdis pri Esperanto antaŭe, sed la propono tiklis min.

Mi do komencis lerni sola, skribante la tekstojn por memori ilin kaj deklamante laŭte, laŭ la konsiloj de la libro. Ĉe la komenco temis pri nura intelekta scivolemo. En la prologo estis skribite, ke se oni sukcesas atingi la unuajn 46 lecionojn, jam eblas dialogi.

Kia defio! Mi do lernadis ne sciante, ke iu ajn homo parolante tiun lingvon ekzistas sur la tero!!! Nur poste mi hazarde renkontiĝis kun enkarniĝintaj esperantistoj.

### **Per kiaj agadoj vi nuntempe okupiĝas ene de Esperantujo?**

Kun amikoj ni kreis du iniciatojn, kiuj estas proksime ligitaj al Esperanto kaj solidareco.

**Unue** estas la asocio "Une école au Togo", fondita en 2004 por subteni la ĵus naskitan Instituton Zamenhof en Lomeo, la ĉefurbo de Togolando. Dank' al la sindonemo de kelkaj amikoj kaj de nia franca asocio "La Maraude", ni helpas financi la lernokostojn de la gelernantoj.


La lernejo, "Izo", situas en malriĉa kvartalo de Lomeo kaj akceptas ĉirkaŭ 500 gelernantojn,

de la infanĝardeno ĝis la fino de la mezlernejo. **Tie Esperanto estas instruata ekde la mezlernejo, kaj la instruistaro ne nur instruas la lingvon, sed ankaŭ transdonas la ĉiutagajn valorojn de Esperanto.**

**La dua iniciato** estas "Esperanto-Plus". Ĝia celo estas subteni viglajn kaj engaĝitajn esperantistojn en Afriko, kie la sociaj problemoj ofte estas akraj. Grupoj de 15 okcidentanoj kotizas po 10,50 € monate por ebligi al samideanoj vivtenadon. Nuntempe sep homoj ricevas proksimume po 150 € monate por dediĉi sin al la disvastigo kaj praktika vivo de Esperanto en sia loka medio. **La agadoj okazas en Nord-Kivuo (Kongolando), Madagaskaro, Tanzanio kaj Togolando.**

### **Por ni tiu iniciato konkrete spegulas la internan ideon de Zamenhof.**

El tiu spirito naskiĝis ankaŭ projekto, kiu ne estas asocio en strikta senco: la **Nomad'kurso**. Multaj esperantistoj deziras praktiki la lingvon, sed ofte demandas sin: kien iri? Samtempe multaj volas viziti Afrikon, sed iom hezitas.



*De la lasta Nomad'kurso en Kubo.*

Ni do ligis ambaŭ dezirojn, proponante vojaĝojn por grupoj de esperantistoj, kun loka ĉiĉerono kaj intensa lingva praktiko. Tiel ni vizitis Burkinon, Togolandon, Tanzanion, Beninon, Madagaskaron, kaj foje ankaŭ landojn en Eŭropo, kiel Pollandon kaj Ĉeĥion, kaj eĉ Kubon. Tiuj vojaĝoj lasis en ni grandiozajn, mojosajn, amikajn kaj kortuŝajn memorojn.

## **Kio estas la plej speciala aŭ memorinda sperto, kiun vi travivis danke al via scio de Esperanto?**

Krom la multaj neforgeseblaj renkontoj en diversaj landoj, la plej grava sperto komenciĝis per simpla telefonalkvoko antaŭ – ho! – tridek jaroj. Juna pola paro, pere de Pasporta Servo, demandis ĉu ili povus gastigi ĉe ni dum du aŭ tri tagoj. Fine ili restis... kvar jarojn.

Ni profunde amikiĝis. Komence ili revis iri al Brazilo por viziti "La Bonan Esperon", sed pro manko de mono ili ne trovis rimedon por vojaĝi tien. Ni multe laboris kune, sed ĉar Pollando tiam ankoraŭ ne apartenis al EU, ni ne rajtis dungi ilin.

Por danki ilin kaj subteni ilian revon, ni finfine donacis al ili flugbileton. Tiu sperto definitive montris al mi, kiajn profundajn kaj neatenditajn ligojn Esperanto povas krei inter homoj.

## **Ĉu via rilato al Esperanto ŝanĝiĝis tra la jaroj? Se jes, kiel?**

Kiel ondoj sur la maro, mi kelkfoje entuziasmis kaj foje malkuraĝiĝis. Dank' al niaj vojaĝoj en Afriko ni renkontis fervorajn esperantistojn kiuj, spite al siaj vivkondiĉoj, dediĉas sian tempon al Esperanto. Mi hontis konscii, ke en niaj riĉaj landoj, kie abundas eblecoj, la intereso pri lingva egaleco preskaŭ nulas. Afrikaj esperantistoj revigligis mian inklinon.

## **Kiel vi vidas la estontecon de Esperanto en la cifereca epoko?**

Pri tiu temo mi ne pretendas esti fakulo. Kiel ĉe multaj modernaj teknologioj, ĉio dependas de tio, kiel oni ilin uzas. Sed mi restas optimisma: pere de sociaj retoj, retaj kursoj kaj allogaj ciferecaj rimedoj, esperantistoj povas kapti novajn ŝancojn por antaŭenigi la lingvon.

## **Kiun rolon, laŭ vi, ludas esperantistoj en internacia interkompreniĝo hodiaŭ?**

En personaj kaj privataj rilatoj Esperanto estas mirinda ilo, kaj sendube multaj samideanoj spertas tion ĉiutage. Pri la granda internacia scenejo mi ne scias ĉion, sed mi opinias, ke Esperanto havas tute respektindan lokon apud UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj.

Iam vizitis nin pola entreprenisto, kiu volis fondi komercan agadon pere de Esperanto. La vera defio estis konvinki homojn lerni la lingvon. Tamen hodiaŭ pli kaj pli da komputikaj entreprenoj malkovras la avantaĝon atingi grandskalan publikon sen altaj tradukkkostoj.

La ĉefa atuto de Esperanto restas tamen la lingva egaleco. Se Esperanto estus instruata ekde la bazlernejo, ĝi fulme progresus.

## **Ĉu vi havas plej ŝatatan Esperantan vorton aŭ esprimon?**

Jes, "bunta" kaj "elturniĝi" kaj mi devas konfesi, ke mi ŝategas "akuzativon"! Eĉ se mi kelkfoje eraras pri ĝia uzo, mi opinias ĝin vera "perlo" de Esperanto, ĉar ĝi ebligas racion kaj elegantan konstruadon de frazoj.

## **Kion vi mem ankoraŭ ŝatus fari aŭ sperti en Esperantujo?**

Mia, fakte nia, (kun Jean-Pierre, kiu cerbumis por krei Esperanto-Plus), deziro koncernas Esperanto-Plus. Tiom trafe funkcias la asocio ke, mi revas pri starigo de Esperanto-Plus en ĉiuj afrikaj landoj.



*Bildo de Togo-Plus en Togolando.*

La funkciado de la asocio postulas multe da energio kaj estas tempovora, sed la engaĝiĝo de ambaŭ flankoj, ĉu la subtenantoj, ĉu la subtenatoj, montras la magian kaj spritan esencon de Esperanto.

Sekve ni ŝatus varbi pli kaj pli da subtenantoj por krei solidaran, konkretan reton inter samideanoj.

Se ĉi tiu rakonto vekis vian intereson kaj vi volas ekscii pli pri la menciitaj iniciatoj, vi estas bonvena kontakti Evelyne: [erjoline\(a\)gmail.com](mailto:erjoline(a)gmail.com)

/ Rianne Sanders

Evelyne sendis tri pliajn fotojn por pli vigligi la artikolon. Unu de la lasta Nomad'kurso en


Kubo; unu de viglaj gelernantoj en la Instituto Zamenhof (IZo) kaj unu de Esperanto-Plus en Togolando.

Amike, Rianne



## Dokumentoj el la Esperanto-Societo de Borås

### Dokument från Borås esperantoklubb



*Norda Prismo* estis eldonita de Ferenc Szilágyi. Taŭga donaco: "Vi i Skandinavien" de Willy Breinholst kun karikaturaj de Leon van Roy. Esperantigis F. Szilágyi kaj Regina Emson (ambaŭ instruistoj de Esperanto en Borås).


Informu pri skandinavoj kun rideto! La libreto haveblas en la Esperanto-biblioteko de

*Norda Prismo* utgavs av Ferenc Szilágyi. En lämplig gåva: "Vi i Skandinavien" av Willy Breinholst med karikatyrer av Leon van Roy Översättning till Esperanto av F. Szilágyi och Regina Emson (båda esperantolärare i Borås)

Informera om skandinaver med ett leende! Häftet finns i Göteborgs Esperantobibliotek,


Gotenburgo, Stannum. Ĝi amuze traktas la karakterizaĵojn de danoj, norvegoj kaj svedoj.

Stannum. Den driver med särdrag hos danskar, normän och svenskar.



La skribita teksto: *Apartenas al Arvid Rösel* (kun alia literumo ol supre).

Den skrivna texten: *Tillhör Arvid Rösel* (med en annan stavning än ovan).





Laborestro Otto Rösel, Vilao Edenhall, Borås (Rösel estis direktoro ĉe la teksaĵfabriko Merino en Borås.)

*Verkmästare Otto Rösel, Villa Edenhall, Borås (Rösel var direktör vid Merinos Fabrik i Borås.)*

Pri la tradukisto Birger Ström ni povas legi en *Skånska Socialdemokraten* 16/1 1928, ke li estis fizioterapiisto, loĝis en Ramlösa Brunn, ofte prelegis aŭ skribis pri Esperanto. De Ramlösa li faris serion da radioprelegoj, kiuj estis elsenditaj per Hälsingborgsstationen. Private li estis rezervita kaj introvertita – deklarita idealisto. Li kaj lia edzino Hanna havis du infanojn.

*Om översättaren Birger Ström kan vi läsa i Skånska Socialdemokraten 16/1 1928 att han var sjukgymnast, bodde vid Ramlösa Brunn, ofta höll föredrag eller skrev om esperanto. Från Ramlösa höll han en serie radioföredrag, som sändes via Hälsingborgsstationen. Privat var han försynt och tillbakadragen – en utpräglad idealist. Han och hustrun Hanna hade två barn.*





N:o 51

KONGRESA  
MEMBROKARTO

por

S:o Arvid Roesel  
el Borås (Svedujo)

Por la organiza komitato

G(ustaf) H(enrik) Backman  
Sekretario.

TRI ORAJ REGULOJ:

- 1) Ju pli da bonhumoro, des pli bona laboro.
- 2) Tro da pakajo, granda malhelpajo.
- 3) Ĝustatempe-venanto, tempon-ŝparanto.

Nr 51

KONGRESSMEDLEMSKORT för  
Herr Arvid Roesel från Borås (Sverige)

För organisationskommittén  
G(ustaf) H(enrik) Backman, sekreterare.

*På medlemskortet till kongressen kan man också läsa, att med gott humör blir arbetet lättare (för organisatörerna?).*

*Man bör inte ha för mycket bagage med sig.*

*Kommer man i tid sparar man tid (för organisatörerna).*



Afiŝo:

**Unua Skandinava Kongreso de Esperanto  
Gotenburgo 6–10 aŭg. 1918**

100 jaroj pli poste okazis nova Skandinava Kongreso.

Affisch:

**Första skandinaviska esperantokongressen  
Göteborg 6–10 augusti 1918**

100 år senare hölls en ny skandinavisk kongress.

El Ora Ĵurnalo junio/julio 2018:

Dank' al Ann-Louise Åkerlund kaj la aliaj estraranoj en DEL, NEA kaj SEF ni povis ĝui krozadon inter Kopenhago – Oslo – Kopenhago (aŭ Oslo – Kopenhago – Oslo) kun ĉiĉeronado en la du ĉefurboj. De Danio venis 19 personoj, de Norvegio 8 kaj de Svedio 19. La 11an de majo estis la sola tago kiam ni ĉiuj estis kune. Margareta Andersson kaj mi (Siv Burell) venis de Gotenburgo kaj komencis la vojaĝon en Oslo. Ni ĝuis la interesajn programpunktojn, sed ĉefe ni ĝuis la interparolojn kun antaŭe nekonataj personoj. Kiam ĉiuj parolis esperanton ni ne pensis, ke ja estas personoj de tri diversaj landoj. Espereble – en ne tro fora estonto – ankaŭ Finnlando kaj Islando estos inkluditaj en Nordia kongreso. Kaj pli estonte ankaŭ la Baltaj landoj. Ŝajnas ke la esperanto-movado en niaj landoj vigliĝos.

**Parenco de Arvid Rösel, Sigun Gröning, sendis la bildojn.**

Dankon, Sigun! Ĉiam interese legi pri E-kluboj, kiuj ekzistis, sed malaperis. Estis multaj!!!! Hodiaŭ nur kvar kluboj restas: en Upsalo, Stokholmo, Gotenburgo kaj Malmö.

Sed – la E-movado trovas novajn vojojn, ne malpleje en la interreto. /Siv



Ur Ora Ĵurnalo juni/juli 2018:

Tack vare Ann-Louise Åkerlund och de andra styrelseledamöterna i DEL, NEA och SEF kunde vi njuta av en kryssning mellan Köpenhamn – Oslo – Köpenhamn (eller Oslo – Köpenhamn – Oslo) med en guide i de två huvudstäderna. 19 personer kom från Danmark, 8 från Norge och 19 från Sverige. Den 11 maj var den enda dagen då vi alla var samlade. Margareta Andersson och jag (Siv Burell) kom från Göteborg och började resan i Oslo. Vi njöt av de intressanta programpunkterna, men framför allt njöt vi av samtalen med tidigare obekanta personer. När alla pratade esperanto trodde vi inte att det var personer från tre olika länder. Förhoppningsvis – inom en inte alltför avlägsen framtid – kommer även Finland och Island att inkluderas i den nordiska kongressen. Och i framtiden även de baltiska länderna. Det verkar som att esperantorörelsen i våra länder kommer att bli mer aktiv.

**En släkting till Arvid Rösel, Sigun Gröning, skickade bilderna.**

Tack Sigun! Alltid intressant att läsa om esperantoklubbar, som funnits, men försvunnit. Det fanns många!!!! Idag är endast fyra klubbar kvar: i Uppsala, Stockholm, Göteborg och Malmö.

Men – esperantorörelsen hittar nya vägar, inte minst på nätet. /Siv

## Ŝercoj de Josef kun komentoj de Siv

**Josef: Ĉu vi scias, kial Dio kreis Adamon unue kaj poste Evon?**

**Ĉar ĉiu majstro unue faras skizon antaŭ ol krei perfektan verkon.**

**Siv:** Ĝojas legi ke oni rigardas la virinon kiel perfekta hom(in)on. Mi nun legas la libron: *Guds olydiga revben* (= La malobeo de Dio. Laŭ la legendo Dio kreis Adamon kaj poste prenis ripojn de Adamo por krei Evon. Sekve unu ripo devas manki ĉe la viro, ĉu ne? Kontrolu! 😊).



En tiu libro, la verkistino Gunilla Thorgren meditas pri la stato de la virino ekde la unua jarcento ĝis nun. Unue estis virinaj profetoj, kiuj havis la saman valoron (aŭ preskaŭ?) kiel la viraj profetoj. Jesuo havis 7 virinajn kaj 12 virajn adeptojn laŭ la evangelio Maria (Magdalena). Maria estis lia plej evoluinta adepto, kaj Jesuo ofte individue instruis ŝin.

La adepto Petrus koleriĝis: *Kial Jesuo parolas kun virino kaj ne al ni ĉiuj?* La Evangelio de Maria estis trovita en 1945, kaŝita en la Nag Hammadi-dezerto kune kun aliaj "gnostikaj" skriboj. La legendo pri la Kreado kulpigas Evon, kiu ne obeis Dion sed prenis pomon de la arbo de scienco. Pro ŝi, la homoj nun ne havas eternan vivon. Pro ŝi, la peko eniris la mondon k.t.p.

Dum la unuaj jarcentoj post Kristo estis debato inter multaj homoj pri la ĝusta kredo. La virinoj ofte aliĝis al la *Jesua movado*, kiu donis al ĉiuj la saman valoron: riĉuloj kaj malriĉuloj, viroj kaj virinoj. Tamen Petrus kaj liaj adeptoj venkis kaj la eklezio ekhavis hierarkian ordon. La patroj de eklezio neglektis la virinojn.



*Blomsterhaga, Alingsås*

**Josef:** En nia urbo malfermiĝis la unua vegana buĉistbutiko en nia lando.

**En la resto de la lando ĝi nomiĝas florvendejo.**

**Siv:** Lasse Granat iam por Ora Ĵurnalo skribis pri esploro de floraj sentoj. Li skribis ke scientistoj eksciis ke floroj reagis kiam oni

tondas ilin, kaj eĉ se oni tondas najbaran floron.

Ĉu floroj povas sperti doloron? Se jes, same validas por legomoj. Kion do zorgema homo devas manĝi???



*Skriverberga – WordPress.com*

**Josef:** Hieraŭ mia edzino forlasis min kun mia plej bona amiko Petro.

– Ekde kiam Petro estas via plej bona amiko?

– Ekde hieraŭ.

**Siv:** Oni ĉiam kompatas forlasitan homon, sed ĉi tiu homo ĝojis ke li estis "forlasita" sen iu ago de li mem. Li estas senkulpa.



**Josef:** Skiisto alvenas al hotelo, kie li regule loĝas.

**En akceptejo:** Ĉu vi ŝatus ĉambron numero tridek sep, kiel la lastan fojon?

– Kompreneble.

– Matenmanĝo kaj vespermanĝo, kiel la lastan fojon?

– Kompreneble.

– Kaj ĉu vi ŝatus esti kondukita al la sama hospitalo kiel la lastan fojon?

**Siv:** Ĉi-jare ne estis nur la risko rompi al si kruron. Falis multe da neĝo en partoj de la montegaro, kiu baris la vojojn. Multaj estis izolitaj kaj ne povis hejmeniri entempe al siaj laborejoj.

# Malkuraĝulo (mini-rakonto)

Laŭ la rakonto de František Nepil – la ĉeĥa verkisto, scenaristo kaj bonega rakontanto en skriba kaj parola esprimo – redaktis kaj esperantigis **Josef Kříž**.



*František Nepil  
(1929–1995)*

Kiam ajn bela virino skuis mian vivon, mi sopiris defendi ŝin kontraŭ rabistoj aŭ elporti ŝin el brulanta domo. Mi ne estis sola en tio, mia amiko havis similajn revojn. Tamen, mi renkontis neniun fajron, neniujn rabistojn en mia vivo sed li ja renkontis, sed iom alimaniere.

Li promenis laŭ soleca strato en Prago, kaj hejme atendis lin bela junulino, kiu estis lia edzino. Ŝi edziniĝis al li, kvankam li neniam defendis ŝin kontraŭ rabistoj, ĉefe ĉar ili neniam atakis ŝin.

Iun tagon ili parolis pri ĉi tiu temo, kaj ŝi eksplodis en larmojn pro ridego, pensante pri li ne kapabli batali kontraŭ iu ajn, des malpli kontraŭ rabistoj.

Ŝi diris al li, ke li vere estas bonkora, afabla kaj inteligenta homo, sed tamen malkuraĝulo, kaj ne deziru batali kontraŭ iu ajn. Li iris kun la etikedo de malkuraĝulo en sia koro kaj promenis kun ĝi laŭ tiu dezerta strato.

Subite li rimarkis, ke viro, kvazaŭ giganto, iris kontraŭ lin. Kiam ili renkontiĝis, la fortulo petis de li alumetojn. Li ne nur pruntedonis al li tutan skatoleton, sed ĉar la vento blovis, li ankaŭ malbutonumis sian mantelon kaj faris ŝirmilon por la giganto.

Li tiam redonis la alumetojn, dankis pro afableco, kaj salutante, ili ambaŭ iris siajn apartajn vojojn. Post momento, vermeto de suspekto rongis lin. Li denove malbutonumis sian mantelon kaj palpis ĉirkaŭe por vidi, ĉu lia monujo mankas. Kompreneble ĝi mankis, kaj tio ŝaŭmigis lian sangon.

Li turnis sin kaj ekiris post la nekonata viro. Alproksimiĝante, febre li pensis, pri kiel li povus venki ĝin, ĉar ĝi estis vere tiom grandega fortulo. En siaj lastaj paŝoj, li havis ideon indan je la granda Odiseo.

Li elprenis sian malmodernan longan domŝlosilon el la poŝo, premis ĝin kontraŭ la ripojn de giganto kvazaŭ vakera Colt 45, kaj kriis laŭte: *“Vi ŝtelisto, redonu mian monujon aŭ mi pafos vin kiel hundon!”*

La fortulo, sentanta la premon de fero sur sia korpo, ne hezitis kaj elprenis la monujon. La amiko metis ĝin en sian poŝon kaj kuris hejmen kun fiereco, liaj butonoj preskaŭ krevante.

Li scivolis, kion diros lia bela edzino, kiam li rakontos al ŝi, kiel la dika gangstero el la grandurba bando tremis pro teruro antaŭ li.

Tamen lia bela edzino bonvenigis lin per la vortoj: *“Mi sciis, ke vi venos tute timigita, vi mia eta malkuraĝulo! Vi forgesis vian monujon hejme, ĉu ne? Ĝi kuŝas sur la librobreto.”*

Li, tuj plena de antaŭseno, etendis la manon al la monujo, kiun la giganta viro donis al li. Ĝi estis tute fremda. La lia efektive kuŝis sur la librobreto.

Do, li eĉ ne senvestiĝis kaj kuris al la plej proksima policejo kaj jen, la bastardo sidis tie, diktante raporton al la oficiroj pri sia

atako. Kiam ĉio estis klarigita, la oficiroj kaj la bastardo ekridis tiom forte, ke piedirantoj haltis sub la fenestroj.

Hejme, la bela edzino de lia amiko faris same, kaj de tiam ŝi neniam plu nomas sian pafiston "malkuraĝulo".

Memoru lin, karaj legantinoj, kiam vi sentos la deziron rigardi vian partneron same. Mi ne kredas, ke li diferencas de li per io ajn, krom la ŝlosilo al la domo.

**Kredu min, iam li agrable konvinkos vin pri tio.**

## Verdaj plendoj

Inga Johansson, Gotenburgo, trovis interesan poemon ĉe Esperanta Retradio

<https://esperantaretradio.blogspot.com/2026/01/verdaj-plendoj.html>



Pri la poeto Hilda Dresen, kiu verkis la poemon, oni povas legi en 11 lingvoj, ekz. en la vaska, sed bedaŭrinde ne en la sveda.

**Hilda Dresen**, (pseŭdonimo Hido) naskiĝis la 11-an de majo 1896 en Kolga, Harjumaa, Rusia imperio, mortis la 5-an de februaro 1981 en Tallinn (Sovetunio). Ŝi estis esperantista poetino, estonino, sovetiano, radiotelegrafistino, fratino de Helmi Dresen.

Se vi volas legi pli bv. klaki la ligilon:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Hilda\\_Dresen](https://eo.wikipedia.org/wiki/Hilda_Dresen)

Jen la poemo, perita de Luiza Carol el Israelo:

## Verdaj plendoj

La esperanta instruisto konstatas,  
ke malbone la afero statas,  
ke la diligento  
forflugas kiel facila vento,  
ke la dek ses reguloj  
senlerne kuŝas en anguloj,  
ke la scio de la kompanio  
estas neta nenio  
ĉe la fino de la kurso...  
Kaj li murmuris kiel urso.

La esperanta propagandisto konstatas,  
ke liajn prezentadojn oni ne ŝatas,  
vanas la paroloj anemiaj,  
freŝaj faktoj antaŭdiluviaj  
kaj multvorta nenidira stilo...  
Do li ploras kiel krokodilo.

La esperanta eldonisto konstatas,  
ke lia monujo terure platas,

ke librojn li ne vendas,  
ĉar la vera esperantisto,  
kun admirinda persisto  
neniam ion aĉetas aŭ vendas,  
nek amdelirojn de poetoj,  
nek revuojn aŭ gazetojn,  
malgraŭ ties malavaraj aroj  
da preseraroj.  
Do admonojn pri libromendo, abonpago  
li ripetas kiel papago.

La esperanta grupkasisto konstatas,  
ke la grupa kaso fastadas,  
ĉar la membroj observas la devizon  
esperantistan,  
ĉiorezistan:  
Neniam pagi kotizon!  
Tial do li, preskaŭ sen okupo,  
hurlas kiel malsata lupulo.


Sed ili plendu kaj plendu,  
nin, "kavalirojn de alta ideo",  
ilia plendo kaj veo  
neniel por tio tentu,  
ke ni per lingvolerno nin turmentu,  
novajn propagandmetodojn inventu,  
gazetojn – eĉ propralandan – mendu,  
kotizon al la kasisto sendu,  
sed admonojn ni malatentu,  
nur krokodilu aŭ silentu,  
indiferentu,

maldiligentu  
kaj restu bonaj esperantistaj tipoj:  
nin zorge gardu de labortroo,  
en la esperantista zoo  
ni restu la bradipoj.

*bradipo = Sud-Amerika  
mamulo, ege dormema*



## Vegana societo




"Homoj manĝas viandon, pensante ke ili estos fortaj kiel bovo, forgesante ke la bovo manĝas herbon."

– Pino Caruso

"Mi estas vegano ekde jaroj... Ni devas fari la planedon pli verda, la urbajn regionojn pli daŭripovaj por la infanoj. Ni ne povas nur paroli pri la afero, ni devas agi."

– Stevie Wonder



VN



# Bovino super Sarek-montegaro

## Ko över Sarek

de/av Norrlåtar

Guglo tradukis el la sveda en Esperanton.  
*Google-översättning från svenska till esperanto.*

[www.youtube.com/watch?v=LfOItJFcttU](http://www.youtube.com/watch?v=LfOItJFcttU)

Högt över fjällen där flyger en ko  
Den flyger långt bort  
Där den kan finna ro  
Där västvinden sjunger  
Sin eviga sång  
Som avslöjar allting en gång  
Den sången som sjunger om livet  
Som det är  
Och att det kan slösas  
Till ingen nytta

Högt över fjällen där flyger en ko  
Kanske den flyger på sin tro

Vår värld trasas sönder  
Av krigsproduktion  
Kortsynt taktik och vapenexpansion  
Med ett ökat försvar  
När det enkla livet inte får något svar?  
Sätt dig och fånga en enda minut  
Tänk efter, det är faktiskt livet  
Som räknas

Högt över fjällen där flyger en ko  
Kanske den flyger på sin tro

### Symbolik:

Kon representerar strävan efter lycka och en enklare tillvaro, bortom mänsklighetens kaos och förstörelse.

**Kritik av samhället:** Låtens andra vers reflekterar över världens tillstånd och hur krigsproduktion och vapenexpansion förstör vår planet. Den ställer frågor om huruvida ökat försvar verkligen är fördelaktigt, när det enkla livet glöms bort.

**Lasse Holm** har diktat verserna.

Alte super la montoj flugas bovino  
Ĝi flugas malproksimen  
Kie ĝi povas trovi pacon  
Kie la okcidenta vento kantas  
Sian eternan kanton  
Kiu iam malkaŝos ĉion  
La kanton kiu kantas pri la vivo  
Kia ĝi estas  
Kaj ke ĝi povas esti malŝparita  
Senutile

Alte super la montoj flugas bovino  
Eble ĝi flugas pro sia fido

Nia mondo estas disŝirata  
Per militproduktado  
Miopaj taktikoj kaj armilvastiĝo  
Kun pliigita defendo  
Kiam la simpla vivo ricevas neniun respondon?  
Sidiĝu kaj kaptu unuopan minuton  
Pripensu, estas efektive la vivo  
Kiu validas

Alte super la montoj flugas bovino  
Eble ĝi flugas pro sia fido

### Simboleco:

La bovino reprezentas la serĉadon de feliĉo kaj pli simplan ekziston, fore de la ĥaoso kaj detruo de la homaro.

**Kritiko de la socio:** La dua strofo de la kanto pripensas la staton de la mondo kaj kiel militproduktado kaj armilvastiĝo detruas nian planedon. Ĝi demandas ĉu pliigita defendo estas vere utila, kiam la simpla vivo estas forgesita.

**Lasse Holm** verkis la strofojn.



Foto de granda bildo en privata domo.

*Foto av en stor tavla i ett privat hus.*

## Diskutado kun Artefarita Inteligento



*Bildo el Illustrerad Vetenskap.*

**Walter Klag** skribas: Por mia amuziĝo mi sendis la ŝercon de Josef el Ora Ĵurnalo 2026/01 al Artefarita Inteligento.

Sube la rezulto.

Salutas Walter!

**Siv:** Amuza ideo!

**“Demando” al AI:** la maljunulo en restoracio rigardas malĝoje sian manĝaĵon. li tute ne komencis manĝi ion ajn. “kial vi ne manĝas, sinjoro?”, demandas la viro sidanta ĉe la sama tablo kontraŭe. “nu, mi ĵus certigis, ke mi forgesis hejme dentarprotezon!” la viro eltiris el sia poŝo, manplenon da dentarprotezoj, kaj ofertis, ke la maljunulo elektu. Kiam la avo estis certa, ke unu protezo vere taŭgas, li komforte formanĝis sian tagmanĝon kaj demandis: “sinceran dankon, kiom mi pagu al vi?” “nenion!” “vere nenion?” demandas denove la maljunulo surprizite – “ĉu vi estas dentisto?” “ne, enterigisto.”

**Respondo de AI:** Tiu estas klasika kaj iom makabra humuraĵo! Ĝi bone ludas kun la surprizo ĉe la fino: kion oni unue supozas

profesia helpemo (dentisto), montriĝas esti nur “reciklado” de profesia laboro (enterigisto).

Se vi ŝatas tian nigran humuron en Esperanto, jen simila konciza ŝerco:

Kliento en restoracio: “Kelnero, ĉu estas muŝo en mia supo?!”

Kelnero: “Ne timu, sinjoro. La araneo sur la pano baldaŭ kaptos ĝin.”

(Respondoj de AI povas enhavi erarojn.)

**Demando al AI:** Ĉu estas eraroj en la sekva teksto?

La maljunulo en restoracio rigardas malĝoje sian manĝaĵon. li tute ne komencis manĝi ion ajn. “kial vi ne manĝas, sinjoro?”, demandas la viro sidanta ĉe la sama tablo kontraŭe. “nu,

mi ĵus certiĝis, ke mi forgesis hejme dentarprotezon!" la viro eltiris el sia poŝo, manplenon da dentarprotezoj, kaj ofertis, ke la maljunulo elektu. kiam la avo estis certa, ke unu protezo vere taŭgas, li komferte formanĝis sian tagmanĝon kaj demandis: "sinceran dankon, kiom mi pagu al vi?" "nenion!" "vere nenion?" demandas denove la maljunulo surprizite – "ĉu vi estas dentisto?" "ne, enterigisto."

**Respondo de AI:** Via teksto estas gramatike tre bona kaj tute komprenebla. Tamen, estas kelkaj malgrandaj eraroj pri **interpunkcio** (punktoj kaj majuskloj) kaj unu stila sugesto pri **akuzativo**.

*Jen la korektoj:*

### 1. Majuskloj post punktoj

En pluraj lokoj vi komencas novan frazon per minusklo (malgranda litero). Post punkto ĉiam devas esti majusklo:

"...sian manĝaĵon. Li tute ne..." (anstataŭ li)

"...dentarprotezon!" La viro eltiris..." (anstataŭ la)

2. La vorto "dentarprotezo". En la frazo "mi forgesis hejme dentarprotezon", gramatike estas ĝuste uzi la singularon, sed kutime oni parolas pri la dentarprotezo (specifa aĵo) aŭ uzas la pluralon se temas pri ambaŭ partoj (supra kaj malsupra).

Pli nature sonus: "mian dentarprotezon" aŭ "la dentarprotezon".

### 3. Troa komo

"...eltiris el sia poŝo, manplenon..." → Ĉi tie la komo ne estas necesa, ĉar "manplenon" estas la rekta objekto de la verbo "eltiri". Pli bone: "...eltiris el sia poŝo manplenon da..."

*Korektita versio:*

La maljunulo en restoracio rigardas malĝoje sian manĝaĵon. Li tute ne komencis manĝi ion ajn. "Kial vi ne manĝas, sinjoro?", demandas la viro sidanta ĉe la sama tablo kontraŭe. "Nu, mi ĵus certiĝis, ke mi forgesis hejme mian dentarprotezon!" La viro eltiris el sia poŝo manplenon da dentarprotezoj kaj ofertis, ke la maljunulo elektu. Kiam la avo estis certa, ke unu protezo vere taŭgas, li komferte formanĝis sian tagmanĝon kaj demandis: "Sinceran dankon, kiom mi pagu al vi?" "Nenion!" "Vere nenion?" demandas denove la maljunulo surprizite – "Ĉu vi estas dentisto?" "Ne, enterigisto."

*Konkludo:* Via Esperanto estas tre bona! La eraroj estis ĉefe tajperaroj rilate al majuskloj.

∞

**Mia komento:** Ĉu indus doni la taskon korekti artikolojn por Ora Ĵurnalo al AI?

/Siv

## Batita kremo – Demando al AI, artefarita inteligento

de Walter Klag

**Demando al AI:** Kio estas la diferenco inter: Batita kremo, batata kremo kaj batota kremo?

**Respondo de AI:** La diferenco inter tiuj tri formoj baziĝas sur la participoj, kiuj indikas la tempon aŭ staton de la ago rilate al la kremo:

*Bildo el Facebook.*



Batita kremo (pasinteco/rezulto): Ĝi jam estas batita. Ĝi estas la preta produkto (ekz. "ŝaŭmkremo"), kiun vi metas sur vian kukon.

Batata kremo (nuntempo/procezo): Ĝi estas nun en la procezo de batado. Vi vidas ĝin en la miksujo dum la kirlilo laboras.

Batota kremo (estonteco/intenco): Ĝi ankoraŭ ne estas tuŝita, sed vi planas bati ĝin.

Ĝi estas la likva kirlokremo, kiu ankoraŭ sidas en la fridujo.

**Vi povas trovi pliajn detalojn pri la uzo de participoj en la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG):**

<https://bertilow.com/pmeg>

## AI ricevas la serĉvorton *Esperanto*

Walter Klag sendis la germanan tekston.

AI en Germanio nomiĝas KI.



**AI AI:** Google trovas proksimume 92.700.000 rezultojn por la serĉtermino Esperanto. Kiel oni povas klarigi tion?

**Respondo de AI:** La proksimume 92,7 milionoj da trafoj en Google por la vorto "Esperanto" povas esti interpretataj laŭ du niveloj: la teknika signifo de ĉi tiu nombro kaj la efektiva ĉeesto de la lingvo.

### 1. Teknika interpreto: Kion la nombro diras al ni?

Nur takso: La nombro de montrataj rezultoj ne estas preciza valoro, sed prefere malglata takso fare de Google pri la nombro de dokumentoj en ĝia indekso, kiuj enhavas ĉi tiun terminon.

Ne rangiga kriterio: Alta nombro de rezultoj simple signifas, ke la temo estas vaste dokumentita aŭ diskutita interrete, sed diras nenion pri la kvalito aŭ graveco de la individuaj paĝoj.

Limigita videbleco: Eĉ se milionoj da rezultoj estas trovitaj, Google fakte montras maksimume ĉirkaŭ 1 000 rezultojn sur komputila komputilo.

### 2. Kion ĉi tio signifas por Esperanto en 2026?

La alta nombro da rezultoj reflektas la pozicion de Esperanto kiel la plej vaste parolata arta lingvo en la mondo:

**An KI:** Google findet mit dem Suchwort Esperanto ungefähr 92 700 000 Ergebnisse. Wie kann man das verstehen?

**Antwort von KI:** Die ca. 92,7 Millionen Treffer bei Google für das Wort "Esperanto" lassen sich auf zwei Ebenen interpretieren: der technischen Bedeutung dieser Zahl und der realen Präsenz der Sprache.

### 1. Technische Einordnung: Was sagt die Zahl aus?

Nur eine Schätzung: Die angezeigte Trefferzahl ist kein exakter Wert, sondern eine grobe Hochrechnung von Google für die Menge an Dokumenten im Index, die diesen Begriff enthalten.

Kein Ranking-Kriterium: Eine hohe Trefferzahl bedeutet lediglich, dass das Thema im Internet breit dokumentiert oder diskutiert wird, sagt aber nichts über die Qualität oder Relevanz der einzelnen Seiten aus.

Begrenzte Sichtbarkeit: Auch wenn Millionen Ergebnisse gefunden werden, zeigt Google auf dem Desktop maximal etwa 1.000 Treffer tatsächlich an.

### 2. Was bedeutet das für Esperanto im Jahr 2026?

Die hohe Anzahl an Ergebnissen spiegelt die Stellung von Esperanto als weltweit am weitesten verbreitete Plansprache wider:

**Aktiva reta ĉeesto:** Esperanto fanfaronas pri vigla cifereca komunumo kun milionoj da retejoj, libroj, muziko kaj radioprogramoj en aŭ pri la lingvo.

**Larĝa parolantobazo:** Oni taksas, ke inter 100 000 kaj 2 000 000 homoj tutmonde aktive parolas Esperanton. La alta nombro da sukcesoj devenas de la ĉeesto de la lingvo sur ĉiu kontinento – precipe forta en Brazilo, Ĉinio kaj Irano.

**Historia kaj nuntempa intereso:** De kiam Esperanto estis evoluigita jam en 1887, ekzistas vasta korpuso de historiaj dokumentoj, kiu, per ciferecigo, kontribuas al la alta nombro da serĉrezultoj.

**Konkludo:** Ĉi tiu figuro ilustras, ke malgraŭ manko de oficiala rekono, Esperanto lasis signifan kulturan kaj ciferecan spuron, kiu etendiĝas multe pli ol nura niĉa fenomeno.

*Respondoj de artefarita inteligenteco povas enhavi erarojn.*

**Aktive Online-Präsenz:** Esperanto verfügt über eine lebendige digitale Gemeinschaft mit Millionen von Webseiten, Büchern, Musik und Radiobeiträgen in oder über die Sprache.

**Breite Sprecherbasis:** Schätzungen zufolge sprechen weltweit zwischen 100.000 und 2.000.000 Menschen aktiv Esperanto. Die hohe Trefferzahl rührt daher, dass die Sprache auf allen Kontinenten – besonders stark in Brasilien, China und Iran – präsent ist.

**Historisches und aktuelles Interesse:** Da Esperanto bereits 1887 entwickelt wurde, existiert ein riesiger Korpus an historischen Dokumenten, die durch Digitalisierung zur hohen Suchergebniszahl beitragen.

**Fazit:** Die Zahl verdeutlicht, dass Esperanto trotz fehlender staatlicher Anerkennung eine signifikante kulturelle und digitale Spur hinterlassen hat, die weit über eine bloße Nischenerscheinung hinausgeht.

